

La Karavelo

internacia kultura magazino en esperanto

Ana Fragoso
intervjuita de LK

**Filino de Estremozo, ŝi estis
en feb. 2010 la ludamikino
de la revuo Playboy en
Portugaliao.**

(português / esperanto)





Enhavtabelo

1	Kovrilo: Ana Fragoso, ludamikino de <i>Playboy</i>	Redaktejo
2	Enhavo – Kolofono	Redaktejo
3	Informo pri La Karavelo kaj pri la rakonto Liberaj tempoj de Eduardo Novembro	João José Santos
4-5	Ĉefartikolo La Karavelo 20 – la sama ŝipo en pli vastaj maroj	Redaktejo
6	Poezio - Fernando Pessoa Mesaço (39-a poemo) – kun pripoeziaj notoj	João José Santos
7	Poezio: Rozalino	João José Santos
8	Poezio - Paŭlino de Akvilejo: Feliça Romo	Gerrit Berveling
9	Poezio: Konfeso de abelo al floro	Mao Zifu
10-17	Centra kajero Ana Fragoso, ludamikino de <i>Playboy</i>	João José Santos
18	Rakonto - Arturo Azevedo: La koko	Roger Gotardi
19	Poezio: Kvar poemoj pri poetoj	Nikolaj Nečev
19	Recenzo: Dicionário Esperanto-Português de António da Silva Almeida	João José Santos
20	Poezio - Widacka: Homo kaj truoj	Edward Jaśkiewicz
21	Poezio - Ferenc K. Sabján: Sub la kokardoj	Tibor J. Szabadi
22-23	Historio: 9-a U. K. de Esperanto - 1913	Djalma Pessata
24	Recepto de nekuiristo: Aljetoj de Mirandelo	João José Santos



La Karavelo

esperanto-editejo

Informoj pri La Karavelo

Informiĝu per la LK-Katalogo, la LK-Mendilo
kaj la LK-Regularo el www.lakaravelo.com
Se vi plu havas dubojn, skribu al lakaravelo@gmail.com

Subteno de La Karavelo

Jen kiel vi povas subteni La Karavelon:
Abonu ĝin. – Aĉetu ĝiajn librojn. – Diskonigu ĝin.
Donacu varojn el La Karavelo.
Skribu aŭ vizitu niajn anoncantojn gratulante ilin
pri anoncado sur niaj paĝoj.

Adreso

La Karavelo
Dr. João José Santos
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal

Telefono (+351) 268 919 000

Telefono (+351) 218 127 801

Fakso (+351) 218 127 801

PoŝTel. (+351) 960 131 515

lakaravelo@gmail.com
www.lakaravelo.com

ISSN (papera): 1647-6980

ISSN (DVD): 1647-6999

ISSN (reta): 1647-3353

Leĝa Depono en
“Biblioteca Nacional de Portugal”
301472/09

La Karavelo aperas

ses-foje jare en PDF – senpage
ses-foje jare en revuoj – ĉiu: 8 €
unu-foje jare en DVD – DVD: 16 €

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos

Konstantaj Kunlaborantoj

Konstantaj verkistoj...

Djalma Pessata (Brazilo)
Eduardo Novembro (Portugalio)
Edward Jaśkiewicz (Pollando)
Geraldo Mattos (Brazilo)
Gerrit Berveling (Nederlando)
Imre Szabó (Hungario)
João José Santos (Portugalio)
Leo De Cooman (Belgio)
Luiza Carol (Israelo)
Nikolaj Nečev (Rusio)
Paulo Sérgio Viana (Brazilo)
Roberto Ribeiro (Brazilo)
Roger Gotardi (Brazilo)
Tibor J. Szabadi (Hungario)
Valentin Melnikov (Rusio)

Revizias

Kurt Fischer (Germanio)
Luiza Carol (Israelo)
(pri La Barko, k.a.)
Roger Gotardi (Brazilo)
Túlio Flores (Brazilo)
Valentin Melnikov (Rusio)

Informadika helpo

José Mendes (Portugalio)

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos (Portugalio)

Fondita de João José Santos
(Portugalio – okt. 2007)



Ekzemplo de papera versio



Antikvaj numeroj en tri volumoj

Magazino La Karavelo

Lingvo: esperanto

Papera versio:

Ses A4-numeroj ĉiujare,
tute koloraj, ĉiu kun 24 paĝoj.

Prezo de ĉiu ekzemplero:

8 € + sendokostoj

Jara abono: 48 €

sendokostoj: LK donacas la sendokostojn

PDF-versio:

Legado per komputilo

post elŝuto el www.lakaravelo.com

Prezo: senpaga



Ekzemplo de DVD-versio

DVD-versio:

Ĉiuj pdf-numeroj, de la unua ĝis la lasta, plus provversioj de aliaj LK-varoj en unu DVD.

Prezo: 18 € + sendokostoj

sendokostoj: al Portugalio 3€ - al E. U. 4€ - al aliaj landoj: 5€

Antikvaj numeroj:

Volumo 1 – n-ro 1 ĝis 6

Volumo 2 – n-ro 7 ĝis 12

Volumo 3 – n-ro 13 ĝis 19

La volumoj estas en formato iom malpli granda ol A4,
kun kovriloj koloraj, griza enhavo, tre ilustritaj.


Prezo de ĉiu volumo: 23 € + sendokostoj.

sendokostoj: al Portugalio 3€ - al E. U. 6€ - al aliaj landoj: 8€

Rabatita prezo por la tri volumoj: 59 € + sendokostoj.

sendokostoj: al Portugalio 9€ - al E. U. 18€ - al aliaj landoj: 24€

Liberaĵ tempoj de Eduardo Novembro



Kovrilo de la verko *Liberaĵ tempoj*

“Iu ‘tok-tok... tok-tok...’ vekas en li nostalgion pri sia preskaŭ forgesita vilaĝeto, kaj li ne bezonas sin turni por antaŭsenti tion, kio elmontriĝos el la nokta ombro: azeno! Azeno trenanta ŝarĝveturilon ekipitan per pneŭmatikaj silentradoj — kontrasto de antikvo kaj moderno — sed la besta ‘tok-tok’ estas nedubeble karakteriza. “Azeno!!!...”, rava sopiro lia. Depost sia enmigrado en la Grandurbon, serĉe de pli bona vivtenado, li ne plu estis vidinta tiom noblan besteton.”

el la 1-a ĉapitro

rakonto 124-paĝa A5-formata

prefacis Luiza Carol k.a.

reviziis António da Silva Almeida k.a.


16 € + sendokostoj

sendokostoj

al Portugalio: 3€

al E. U.: 4€

al aliaj landoj: 5€




Postkovrilo de *Liberaĵ tempoj*

AĈETU LA LK-VAROJN EN VIA ESPERANTO-ASOCIO
SE TIO NE EBLAS, AĈETU REKTE AL LA KARAVELO

PRENU LA LK-KATALOGON EN

lakaravelo@gmail.com

www.lakaravelo.com



João José Santos

joaojosesantos@gmail.com

La Karavelo 20

la sama ŝipo en pli vastaj maroj

TIMIDA APOGO DE LA ESTREMOZA URBODOMO

Post la lasta politika loka balotado, la urbodomo de Estremozo ekhavis novan registaron. Do, la LK-direktisto devis interparoli kun la nova estremoza kulturestro, kiu apogis la eldonadon de la tria jara volumo de La Karavelo. Lia decido daŭrigi la apogon komenciĝintan en la antaŭa registaro sin bazu sur la efektiva laboro de La Karavelo en la disvastigado de la nomo, eventoj kaj kulturo de Estremozo tra la mondo pere de esperanto.

En la lasta administrado, la direktisto de La Karavelo pritraktis la aferojn rekte kun la prezidanto de la urbodomo. Ĉi tiu prezidanto delegas al la kulturestro la kulturajn aferojn, bone, sed ĉi tiu ne estas facile kontaktebla, ne persone, ne telefone, kaj ne retmesaĝe.

Post kvin monatoj de provoj, ke la nuna kulturestro aprobu la subtenon al la 20-a numero de La Karavelo, en kiuj lia sekretariino jen menciis lian aprobon jen lian malaprobon al ĉi tiu numero; finfine ŝajnas ke la kulturestro ne aprobas la kovrilon... Iel kaj ial, bela ino sur la LK-kovrilo tro perturbas lin. La direktisto de La Karavelo jam sciigis tiun sinjoron, ke La Karavelo ne estas la revuo *Playboy*, sed ĝi sammaniere ne estas la paroka revuo. Post tiu retmesaĝo, en kiu la direktisto de La Karavelo proponis aliajn manierojn subteni ĉi tiun revuon, klopodante negoci la aferojn, la kulturestro respondis... nenion. Nu, la batalo estas tre malproksime de la fino.

KIU LEGAS LA KARAVELON?

Oni ĉi tiel povas resumi la situacion: multaj legas, malmultaj aĉetas.

Nuntempe la homoj estas alkitimiĝintaj legi librojn kaj revuojn senpage en la reto. Kelkaj fakte ne povas pagi, kaj por tiuj La Karavelo ĝentile disponebliĝas senpage en la reto. Tamen, aliaj povus aboni nian revuon,

sed ne multaj faras tion. Kiel vendi pli da ekzempleroj de La Karavelo? Oni devas doni al ili pli da motivoj aĉeti nian magazinon.

Tre ofte kruciĝas kun la redaktisto de LK, en la babilejo de Lernu kaj aliloke, esperantistoj kiuj legas La Karavelon en PDF. Kompreneble tio ĝojigas la LK-redaktiston, kiu tiel perceptas, ke nia revuo diskoniĝas tra la landoj, iom post iom.

Tamen, ili legas en PDF. Tio estas bona por la diskonado de LK, sed ne bona por la mona ekvilibro de ĉi tiu esperanto-editejo, kiu ne povas plu vivi nur per la memofero de sia fondinto.

Espereble, la ŝanĝoj menciataj en ĉi tiu ĉefartikolo multnombrigos niajn abonantojn kaj allogos al La Karavelo kelkajn anoncantojn.

ŜANĜOJ EN NIA REVUO

Ĝis nun (2007-2009) nia revuo aperis 19-foje en du versioj: la pdf-versio donacita kaj elŝutebla el la LK-retejo, kaj la papera versio en jaraj volumoj, kiuj aperis 3-foje enhavantaj la 19 revuojn. Ekde la numero 20, nia revuo ne plu aperos kiel jara volumo, sed kiel sinsekva papera revuo, kiel ĝenerale okazas ĉe la aliaj magazinoj.

Ankaŭ la formato de nia revuo iom ŝanĝiĝis. Ĝi estis iom malpli granda ol la formato A4, sed ekde la numero 20 ĝi aperos en pura A4-grandeco.

Ĝis nun La Karavelo aperis kolora en la reto, sed blankenigra en la papera versio. Ekde la numero 20, LK aperos kun la samaj koloroj en ĉiuj siaj versioj. Ne, la karavelestro ne gajnis loterion, sed li plu strebas liveri al vi esperanto-kulturan revuon, kiu estu digna je nia lingvo. La nuntempa mondo estas grafike kaj kolore tre riĉa. Interreto kaj televido, revuoj kaj ĵurnaloj, ĉiuj konkurencas por doni al la publiko belaspektajn informilojn, kiuj kaptu la atenton de junuloj kaj de aliaj homoj. En

tia mondo oni vivas nuntempe, en tiu mondo do devas vivi La Karavelo. Tiel, per koloro, nia magazino pli efike kaptos la atenton de la neesperanta publiko, precipe de la junuloj, pli sukcese vendos anoncojn, kaj ankoraŭ pli bone, bele kaj taŭge servos la legantojn.

Pli detalaj ŝanĝetoj ne menciindas, ĉar vi, kara leganto, facile rimarkos ilin foliumante la revuon.

Nia revuo plu aperos 6-foje jare. La pdf-versio plu estos senpaga kaj sen printebleco. Ĉiu el la tri eldonitaj jaraj volumoj plu estas aĉetebblaj, kaj ekde nun ankaŭ la apartaj revuoj. Abono de nia magazino eblas ekde nun.

PLEJ GRANDA ŜANĜO: TEMARA

La menciitaj ŝanĝoj estas grandaj, sed la plej granda kuŝas sur la speco de nia revuo.

Kian revuon ni havis dum 19 numeroj?

Ekde sia unua numero, La Karavelo aperigis frazon, sur la kovrilkapo, kiu klare montris, kia revuo ĝi estis: *Beletra esperanto-revuo pri la portugallingva literaturo*. Ĝia fondinto, filologo pri la latina, helena kaj portugala lingvoj, kaj konscia pri la vasteco kaj fekundeco de la portugallingva literaturo, intencis tiam konigi tiujn valorajn verkojn al la esperanta publiko. Tamen, la sperto de pli ol du jaroj montris, ke (1) la nunaj esperanto-verkistoj, kiuj povus labori kompetente en ĉi tiu kampo estas malmultaj, kaj ili estas absorbitaj de multaj aliaj esperanto-laboroj; kaj (2) ŝajnas ke la esperanto-legantaro, kvankam bone ricevis kaj aprezis nian revuon, tamen ne tiom ŝatas beletron por elspezi monon por portugallingvece beletra revuo. Do, montriĝis la neceso fari ŝanĝojn ankaŭ pri la speco de nia magazino, por larĝigi la nombron de verkistoj, kaj por larĝigi la nombron de eblaj abonantoj.

Kian revuon ni havos ekde nun?

Ĉi tiu numero, la 20-a, jam aperigas alian frazon sur la kovrilkapo: *Internacia kultura magazino en esperanto*. Tiel La Karavelo larĝigas sian agadkampon al ĝenerale kulturaj aferoj kaj rezignas pri la ĉefeco de Portugalbeletraj temoj. Do, iom post iom, la temoj varios, kaj dezirinde aperos aliaj verkistoj, fakaj pri aliaj kulturaj kampoj, kiuj povos diversigi la temojn de la artikoloj.

Kompreneble plu aperos poemoj, rakontoj, filologiaj studoj kaj similaj artikoloj. Tamen, dezirinde aperos verkistoj kompetentaj prezenti artikolojn pri DNA, klonado, historio, arkeologio, religio, politiko, hundoj, puloj, vampiroj kaj pri multaj aliaj temoj.

La centraj paĝoj okupiĝos ofte pri dosiero



De beletra revuo al ĝenerale kultura magazino



unutema. La unua, de ĉi tiu numero, estas dediĉita al ludamikino de la portugalia versio de la magazino *Playboy*. Beleco ĉiam karakterizis La Karavelon, kaj la redaktisto ne vidas motivon por eviti varmajn temojn. Bedaŭrinde la nuna kulturestro de Estremozo ne konsentas, sed li mem vivu kun sia problemo.

JARA KOMPAKTA DISKO

Ekde 2010 inkluzive, LK eldonos jaran DVDn, kiu nomiĝos *La Karavela Disko 2010*. Tiu DVD enhavos ĉiujn LK-numerojn, la tiaman katalogon de LK, disvastigan materialon, pdf-versiojn, ktp.

LA PREZO DE LA KARAVELO

Ne malmultkosta ĝi estas. La revuoj devas vivi el anoncoj, el vendoj kaj/aŭ el subtenoj. Anoncojn La Karavelo ekhavas, pri abonoj ekaperas kelkaj, kaj pri la plua subteno de la estremoza urbodomo, nun ĝi ne ekzistas. Ju pli da presaĵoj, des pli malalta estas la prezo de la revuoj. LK ne havas multajn abonantojn, ĉar la homoj legas ĝin en la reto, do senpage. Kiuj solvoj antaŭvideblis al la LK-direktisto? (1) Tute rezigni pri La Karavelo; (2) eldoni ĝin nur rete kaj senpage; (3) eldoni ĝin blankenigre kaj/aŭ en formato A5, rezignante pri vendo de anoncoj kaj eble pri abonoj; (4) eldoni ĝin en impresa formato A4, tute kolora, strebante vendi anoncojn kaj abonojn, kun prezabono, kiu ne estas malalta, sed kiu ankaŭ ne estas skandale alta, se oni konsideras la altan kvaliton de la revuo laŭ ĉiuj aspektoj.

La LK-direktisto elektis la lastan eblecon. La tempo diros, ĉu tiu estis la plej bona solvo.

Dankon al niaj verkistoj pro ilia talento kaj kunlaboremo, al niaj reviziistoj pro ilia zorgemo kaj atento, al niaj legantoj kaj al ĉiuj, kiuj iel helpas La Karavelon navigadi kaj eĉ bolini. Fakte, ne eblas stiri ĉi tiun velŝipon sen granda lerteco velumi kontraŭ la ventoj.





Mesaço

de Fernando Pesoo

João José Santos

trad. el la portugala, didaktika noto

TRIA PARTO

2

LA AVIZOJ

3-A

(portugala originao)

'Screvo meu livro à beira-mágoa.
Meu coração não tem que ter.
Tenho meus olhos quentes de água.
Só tu, Senhor, me dás viver.

Só te sentir e te pensar
Meus dias vácuos enche e doura.
Mas quando quiserás voltar?
Quando é o Rei? Quando é a Hora?

Quando virás a ser o Cristo
De a quem morreu o falso Deus,
E a despertar do mal que existo
A Nova Terra e os Novos Céus?

Quando virás, ó Encoberto,
Sonho das eras português,
Tornar-me mais que o sopro incerto
De um grande anseio que Deus fez?

Ah, quando quiserás, voltando,
Fazer minha esperança amor?
Da névoa e da saudade quando?
Quando, meu Sonho e meu Senhor?

(esperanta traduko)

Skribas mi libron ĉagrenborde.
Ne devas mia koro havi.
Miaj okuloj varmas akve.
Nur vi, Sinjor', min donas vivon.

Nur senti vin kaj vin pripensi
miajn vakuajn tagojn oras.
Kiam deziros vi reveni?
Kiam la Reĝo? Kiam l' Horo?

Kiam reestos vi la Kristo
de la perdintaj la falsDion,
kaj ekde malbon' je mi vekos
la Novajn Teron kaj Ĉielojn?

Kiam vi venos, Vualito!,
Rev' de l' eraoj portugala,
estigi min pli ol ajnblovo
de dezireg' de Di' farita?

Kiam deziros vi, revene,
fari esperon mian amo?
El la nebul' kaj saŭdad' kiam?
Kiam, Rev' mia kaj Sinjoro?

DIDAKTIKA NOTO

La esenco de poezio kuŝas sur du nepraj elementoj, sen kiuj oni malfacile povas klasifiki verkon kiel poemon: la ritmo kaj la origineco. La unua apartenas al la priforma strukturo de la poemo, la dua apartenas al ĝia interna strukturo. La ritmo donas al la teksto muzikecon faritan el vortoj, per la alternado de akcentaj kaj neakcentaj silaboj. La origineco konsistas el ĉiuj poemaj elementoj, kiuj mirigas, admirigas, revigas kaj ravas la leganton, transdonante al li specialajn sentojn kaj/aŭ pripensojn.

Ĉi tiu poemo origine obeas al la ritma strukturo 1:4:6:8, kaj al la rima skemo ABAB en ĉiu strofo. La traduko restigas la enhavon semantikan, la tropon kaj la ritmon. Pri la rimo, ĝia konservado postulus perfidojn al la aliaj cititaj elementoj de la poemo, kaj do la tradukisto tute ne zorgis pri ĝi. Estus facile al la tradukisto restigi ĉiujn rimojn, perfidante la semantikan enhavon, la tropon kaj/aŭ la ritmon de la poemo. Tamen, tia laboro videblus tre malbona al homo, kiu iom spertu pri poezio.

La komplekseco kaj ambigueco de la originao postulas de la tradukisto la restadon de kelkaj semantikaj strukturoj, kiuj en esperanto ŝajnos tiel ambiguaj kiel en la portugala. Kelkaj esperantistoj, leginte la poemon, eble pensos, ke ĝi estis malbone tradukita, ĉar ĝi estas ambigua kaj kelkfoje ne klara. Tamen, tiun saman impreson havas la portugallingva leganto. Tamen, la tradukisto certas, ke kelkaj versoj estos pli facile kompreneblaj en esperanto ol en la portugala, eĉ se legataj de... portugallingvano.

Ĉu la traduko restis perfekta? Ne. Perfekteco en tradukado ne ekzistas. Se oni volas rigore scii, kion diris Fernando Pesoo, oni lernu la portugalan lingvon kaj oni multe studu beletron. La tradukoj estas provoj alirigi la tekstojn al homoj, kiuj ne regas la originajn lingvojn. Tamen, la tradukisto certas, ke ĉi tiu esperanta traduko estas multe pli bona ol la tradukoj faritaj en aliaj lingvoj, kiujn la tradukisto devas gvati fojfoje.





João José Santos

Rozalino

Iam kaj iam nokte en verdaj literoj,
mi paradize flirtas tra fantomaj revoj,
inter lazuraj vortoj kaj enormaj mevoj,
dum vi enpace plu dormas en sonĝaj veroj.

En liton mi eniras malfrue... matene...
kaj viaj vortoj ĉiam estas mildaj,
kaj via zorgo estas ĉiam
pri sano mia, pri farto mia, pri ĝojo mia.

«Ho, mia Donkiĥoto!» - diras vi ridete -
«Ĉu multajn muelejojn vi batalis?»
Kaj mi ridas infanece.
Vi kredas min kaj miajn utopiojn vi fidas,
ĉar vi legas mian koron.

Senrezone vi akceptas min,
senriproĉe vi observas min,
senakuze vi komprenas min,
senpripense vi ricevas min.

Same kiel la maro akceptas la riveron,
same kiel la floro observas la abelon,
same kiel la Luno komprenas la homaron,
same kiel la grundo ricevas la pluvakvon.

Parfumas mia vin' pro via sublima pokalo,
navigas mia vivo pro via ĝentila mano,
ripozas mia kor' sur via delikata lano...
Ĉar estas Rozalino vi, estiĝas mi Rozalo.



Esperanto em 30 horas *João José Santos*

- ★ Língua: **português** europeu
- ★ Prefácio de Geraldo Mattos
- ★ A5 – 300 páginas – ilustrado
- ★ Manual com 25 lições
- ★ Guia Gramatical ★ Anexos
- ★ Vocabulário Esper.-Português
- ★ Vocabulário Portug.-Esperanto

25 euros mais portes de envio



1. **compre o livro**
2. **divirta-se com ele uma hora por dia durante 30 dias**
3. **pronto... um outro mundo, janelas novas, novos amigos, a aldeia global à mão**

lakaravelo@gmail.com



Gerrit Berveling

trad. el la Latina



Karolo La Granda

Iom pri Paŭlino

Paŭlino (aŭ Paŭleno) grave rolis kiel teologo, gramatikisto kaj poeto en la Karolida Renesanco, kiu fontis el la Kortego de Karolo la Granda.

Naskita en Friulo, li estis post edukiĝo en Cividale del Friuli ordinata pastro; poste ekgvidis la instruadon en Cividale. Li fariĝis fama pro sia scio pri Latina literaturo, teologio kaj juro. En 776 Karolo la Granda invitis lin al sia kortego en Aachen (Aĥeno).

Tie li amikiĝis kun i.a. Alkvino, Paŭlo Diakono, Teodulfo de Orleano.

En 776 Paŭlino fariĝis patriarĥo de Akvilejo. En tiu funkcio li partoprenis en la koncilio de Regensburg, 794, kaj en la sinodo de Frankfurto.

En 798 kune kun dek aliaj episkopoj, li rolis kiel reĝa sendito de Karolo la Granda al la papo.

Vidu pli en: <http://wikisource.org/wiki/Brevier-Himnoj>

Feliĉa Romo ^{1 2}

de Paŭlino 2-a de Akvilejo

Feliĉa Romo, kiun la valora sang'
de tiom da ĉefuloj vestis per purpur'!
Superas vi la brilon de la tuta mond'
ne propralaŭde, sed dank' al la sanktular',
kiun per sangavidaj glavoj murdis vi!

Do ambaŭ nun martiroj, vi en pleja glor',
vi sankta Petro, Paŭlo vi, lili' de l' mond',
herooj triumfantaj en ĉiela hal',
per viaj preĝoj benaj vi protektu nin
de kiu ajn malbon', kaj supren levu nin!

Al Patro estu glor' tra senmezura temp',
al vi, ho Filo, pompo kaj regadopov',
honoro kaj potenco same al Spirit';
nedisigebla savo al la Triunu'
tra ĉiuj tempoj kaj eonoj, en etern".

FORGEJO DE JOÃO JOSÉ LOPES PAULINO

forĝaĵoj – neoksidaĵoj
pordegoj – metalaj strukturoj – aŭtomataĵoj

Zona Industrial, lote 130 – 7100 Estremoz
Tel.: 268 334 358 – Poŝt.: 963 354 426

DIETMOZ, LDA de Anabela Gomes



ortopediaj varoj – naturaj varoj

Largo da República, 15-16 - 7100-505 Estremoz
Tel.: 268 333 507

¹ Latina nomo: "O Roma felix". (GB)

² Paŭlino 2-a de Akvilejo (latine "Paulinus de Aquileia", (ĉ. 730/740-802). (GB)





Mao Zifu

Konfeso de abelo al floro

sen via aromo,
mi ne flugus kilometrojn
por viziti vin
spite al montaro kaj riveroj.

sen via belo,
mi ne vin karesus dum aŭtuno
por aprezi vin
spite al ĵaluzo de ventego.

sen via juneco,
mi ne kius vin avide
nek suĉus la mielon el via pistilo
spite al envio de papiliaro.

inter vi kaj mi
amoro ne troviĝas.
vi kredas je sunlumo
sed mi servas al reĝino.

rilate al amo?
mi ne aŭdacas peti de vi koron
sed mi, antaŭ morto
flugos sub vin kaj fariĝos sterko.



Foto de Mao Zifu

Pri Mao Zifu

Naskiĝis en 1963. Li estas ĉina esperantisto kaj Esperanto-verkisto, unu el la plej gravaj nuntempaj poetoj en Esperanto.

En julio 1984 li diplomitiĝis en la fakultato pri matematiko, en la Hunan'a Normala Universitato (1980-84). Septembre de la sama jaro li ekinstruis matematikon kaj komputikon en la teknika lernejo de la Changde'a Informoprojekta Lernejo. En 1985, dudek-du-jara, li paraliziĝis pro trafik-akcidento. De tiam li, sola ankoraŭ nun kaj eble por ĉiam, restas longan tempon en sia ĉambreto, instruante matematikon, komputikon kaj bazan anglan lingvon al lerneĵanoj por siaj vivteno kaj tempopasiĝo, kaj uzante Esperanton, kiun li eklernis en 1986. Li estas multjara kunlaboranto de la magazino *Monato*.

Maje de 1997 li posedis sian propran komputilon, sekve sin dediĉas ĉefe al desegnado de retpaĝoj privataj aŭ komercaj kaj al traktado de bildoj movaj aŭ senmovaj.

Por li, Esperanto restas pan' spirita.

Premioj gajnitaj de Mao Zifu

- 1995 – premio Nova Talento, en la Belartaj Konkursoj de UEA
- 1997 – premio Grabowski
- 1999 – literatura premio de ĈEL

Verkoj de Mao Zifu

Prozo

Novelo aperis en "Tempo fuĝas" (1995).
Eseo aperis en "Lingva arto" (1999).
Noveloj kaj ciklo en FONTO n-ro 280 (2004/4), en Speciala Numero.

Poezio

Ŝanĝado (1997, eld. La Kancerkliniko)
Kantoj de Anteo (2006, eld. Mondial)

Tradukoj

La Espera Vojo, verkita de Chen Haosu
(2009, eld. Ĉina Fremdlingva Eldonejo)

Pli en: http://eo.wikipedia.org/wiki/Mao_Zifu



João José Santos kaj Ana Fragoso
(foto de La Karavelo)

Ana Fragoso

intervjuita de LK

Filino de Estremozo, ŝi estis en feb. 2010 la ludamikino de la revuo *Playboy* en Portugalio.

João José Santos

La Karavelo ofte noticas interesajn okazaĵojn pri la estremoza vivo. Ana Fragoso estas el Estremozo kaj ŝi prestiĝas sian urbon per la artisma reliefo, kiun ŝi havigas al si kiel amatora fotomodelo. Ŝi restis en la unuaj dek lokoj en sinprezentado por la revuo FHM en Portugalio, kie konkursis multaj kaj belaj inoj. Post tio, Ana estiĝis en februaro 2010 la ludamikino de la revuo *Playboy* en Portugalio. Tiu revunumero rapide elĉerpiĝis en la tuta urbo Estremozo. La du lokaj gazetoj, *Brados* kaj *Ecos*, noticis la okazaĵon. La unua per notico, la dua per intervjuo kun fotoj prenitaj en unu el la plej ŝikaj restoracioj de la urbo, *A Cadeia Quinhentista*, ĉe la kastelo.

Ni interkonatiĝis en unu el la kafejoj en la centro de la urbo, *Pastelaria Formosa*, post la interŝanĝo de retmesaĝoj, kiu preparis la intervjuon. El ĉi tiu juna brunbelulino montriĝas fortkaraktera, decidema kaj inteligenta homo, kiu ĝentile cedis siajn fotojn por ĉi tiu numero de *La Karavelo*.



Ana kaj la koramiko Pedro Borrego

Saluton, Ana! Plezure interkonatiĝi kun vi!

La plezuro estas mia.

Parolu pri vi mem. Kiu estas Ana Margarida Fragoso?

Mi naskiĝis en Estremozo antaŭ 20 jaroj, sed fakte kelkfoje mi ankoraŭ sentas min kvazaŭ infano, kiu sin balancas de arbo, kaj kiu ŝatas spekti animeojn. Mi kreskis en Estremozo, kie mi studis ĝis la eniro en la fakultaton.

Ĉirkaŭ la 13-jaraĝo, mi ekfrekventis la gimnastejon, ĉar tiam mi estis tro malgrasa. Do, mi ekhavis kelkajn formojn kaj mi ekŝatis la modon kaj la fotoarton. En tiu aĝo, mi frekventis ankaŭ kurson pri pozado. Tiam mi lernis defili. Tiel ĉio komenciĝis. Post ĉirkaŭ kvin jaroj, mi frekventis kurson pri instruado de fitneso ¹ en Lisbono, preskaŭ samtempe kiam mi eniris la superan kurson pri Psikologio de la Sporto, en Rio Maior ².

Mia personeco min dividas. Unuflanke mi estas enmimemiĝema kaj hontema, aliflanke mi kapablas min liberigi el tiu hontemo tiagrade, ke mi pozis nuda por *Playboy*. Ĉi tio ne ŝajnas vera, sed fakte ĝi veras. Mi sentas, ke mi estas tre komforta antaŭ la fotilo, kaj mi havas ian riĉecon en la korpa esprimado, kiu preterpasas la ordinaron. Mi forlasiĝas en kuntekstoj kaj situacioj defiantaj, en kiuj multaj homoj ne estus komfortaj. Tio ĉi okazas ne nur kiam oni fotas min, sed ankaŭ en la danco, en la ritmo, en la rigardado, en la rideto, en la forto kiu saturas mian ĉeeston, sed nur se mi ne estas devigata esprimi min per vortoj.

¹ Fitneso: el la angla "fitness". (JJS)

² Rio Maior: portugalia urbo, ĉ. 80km dista de Lisbono, kiu disvolvis kelkajn gravajn strukturojn por la sporto. (JJS)

Mi estas ordinara ino: mi studas, mi laboras, mi legas, mi tre ofte frekventas la gimnastejon, mi amindumas, mi atentas pri tio kio okazas en la mondo, kaj mi klopodas respekti la aliajn homojn.

Ĉu via koramiko reagas pozitive al via steleco kiel fotomodelo?

Li ĉiam reagis tre bone al ĉi tiuj miaj etaj laboroj, kaj li ĉiam estis la unua apoganta kaj stimulanta min. Li mem kontrolas kaj zorgas pri mia korpa ekzercado kaj pri mia bona fizika formo.



Simila al esperanta steleto

Ana, kiel oni sukcesas tian sveltan korpon?

Mi sukcesas ĝin per multe da laboro. Mi praktikas preskaŭ ĉian sporton. Mi iras al la gimnastejo ĉiutage, precipe por muskolado, ĉar ĝi estas la strebilo por korpo "svelta", kiel vi diras. Mi ne nomus ĝin svelta, sed korpo kun difinitaj formoj.

Mi ricevas grup-lecionojn pri ŝtup-irado, pri aerobiko, pri korpa lukto, mi kuras ĉiam kiam mi povas, kaj ekde la infanaĝo mi praktikas naĝadon. Mi faras ĉion eblan por plibonigi mian korpon, kaj kun plezuro.



Ana kun la kunulinoj en la karnavalo de 2010 en Estremozo

Ankaŭ pri manĝado mi tre atentis. Mi klopodas manĝi en ĉiun trian horon. Mi englutas tre malmulte da sukero, da salo kaj da graso. Mi ne trinkas alkoholaĵojn, kaj mi elektas manĝi pli da fiŝo kaj blankan viandon ol ruĝan viandon. Ankaŭ tre gravas, ke mi dormas la necesajn horojn, kiel mi ĉiam faras. Mi sekvas ĉi tian vivostilon, ne nur pro la korpa beleco, sed precipe por mia sano.

Mi jam komprenis, ke vi senpene restas for de la ŝafida viando, de la ruĝa vino kaj de la bongustaj desertoj de ĉi tiu bela regiono.

Kompreneble, jes. Sed ne pensu, ke tio estas memofero. Mi ne manĝas tiaĵojn, ĉar mi ne ŝatas ŝafidan viandon. La paska rito, en kiu oni buĉas la ŝafidon por ĝin manĝi, per si mem, min naŭzas. Vino, blanka aŭ ruĝa, ia ajn ĝi estu, ne plaĉas al mi. Mi ne trinkas alkoholaĵojn, nek manĝas desertojn.

De kiam mi estis infano, ĉiam ekzistis dolĉaĵoj en mia hejmo. Tamen, malkiel la aliaj infanoj, jam tiam mi tute ne manĝis dolĉaĵojn. La adoltoj miris pro tio. Oni rakontas al mi, ke kiam mi ekmanĝis solidaĵojn, mi preferis supon kaj tomat-salaton ol la kaĉojn ĝenerale manĝataj de la beboj. Do, kiel vi vidas, mi rezistas al ĉiuj tiuj "pekoj", tre simple ĉar mi ne ŝatas ilin.

Delicaj picoj
je maldika kaj kreketa flano

Menciu, ke vi vidis ĉi tiun anoncon
sur La Karavelo por ekhavi

10%
Rabato sur ĉiu fakturo

ZUCCHERO ITALIANO
PIZZAS & PASTAS

Rua Marquês Sá da Bandeira nº14 A/B 1050-148 Lisboa - S. Sebastião
Mendu: (+351) 213147316

Vi estas bonŝanca. Ie mi legis, ke via plej granda revo estas la feliĉo. Nu tion ĉiuj ni volas. Kio donus feliĉon al vi?

Mi ne bezonas multon por esti feliĉa. Mi ne havas ambiciojn materiajn, kiuj povus kompromiti mian feliĉon. Tiel kiel vi diras, mi volas kion ĉiuj volas: Amon. Pro ĝi, ni estas sur la Tero, kaj tiu koncepto enmetas ĉion necesan por esti feliĉa.

Tre baldaŭ, vi estos licenciito pri Psikologio de la Sporto. Ĉu vi laboros en psikologio?

Sincere, mi ŝatus. Finfine tiun kurson mi studas, kvankam pli interesas al mi la sporto ol la psikologio. Mi opinias, ke la psikologio de la sporto estas interesa, ĉar mi ekhavas kompetentojn por kompreni kio okazas en la menso de la sportistoj, kial ili agas iel, kaj kiujn ecojn ili devas havi por praktiki sporton. Mi laboras por tio, kaj mi esperas ke mi laboros en ĉi tiu fako, sed mi ne povas diveni kion la estonto gardas por mi.



Ĉu vi sukcesos akordigi vian agadon de fotomodelo kun tiu de sporta psikologo?

Jes, facile. La fotopozado estas unu el miaj pasioj. Tamen, oni ne povas diri, ke mi estus profesia fotomodelo. Tial tio ne okupas multan tempon el mia vivo. Nuntempe mi ankoraŭ ne estas psikologo, ĉar mi ankoraŭ ne finis la kurson. Mi esperas, ke baldaŭ mi laboros en tiu fako. Se iam mi faros kelkajn fotajn laborojn, mi klopodos akordigi tion kun mia profesio.

Ambaŭ ni scias, ĉar ni loĝas en Estremozo, ke ĉi tiu socia etoso estas iom fermita. Ĉu vi havas problemojn en Estremozo pro via apero nuda en la portugalia *Playboy*?



La Karavelo en A4-volumoj de 2007 - 2008 - 2009

★ Ĉiu volumo: ĉirkaŭ 6 revuoj
★ Kunlaboras Gerrit Berveling,
Geraldo Mattos, Valentin
Melnikov, Imre Szabó, Paulo
Viana, Luiza Carol, ktp.

★ Kolora bindo – grizaj bildoj – bonkvalita presado

ĉiu volumo: 23 eŭroj plus sendokostoj



Mi havis neniun problemon, kvankam alvenis al mi klaĉoj pri komentoj kaj kritikoj, kelkaj pozitivaj kaj kelkaj negativaj. Tamen, pro tio ke nenio tia tuŝas min, mi eĉ ne deziris ekscii. Nu, estas bone, ke oni parolu pri ni. Se tio okazas, do oni atentis al mi, kaj mi ŝatas tion.



Pro tio, ke mi faris nenion, pri kio mi ne fieru, kaj mi vidas la nudajn fotojn kiel arton, mi opinias, ke estis nur pozitive por la estremozaĵoj la spektado de mia ekspoziciado. Tiel la homoj kreskas kaj la mensoj ŝanĝiĝas.

Impresas min via karakterata forto kaj ankaŭ via volemo. Kaj kio pri viaj gepatroj, cetera familio kaj amikoj? Kiel ili vidas vian sukceson en la mondo de la fotopozado?

Kun estimo ili vidas tion. Mia patro amas la fotoarton, kaj li mem fotas min plej ofte. Mi memoras, ke kiam mi estis knabineto, sur la tabloj de mia hejmo videbliĝis la magazino *Photo*, en kiu aperis lindaj inoj, nudaj aŭ preskaŭ nudaj, sur la kovrilo. Tiam mi aŭdis, ke la ina korpo estas belega kaj fotinda. Do, mia patro apogis min, ĉar li pensas kiel mi, kvankam li ĉiam min avertis pri la aliaj flankoj trans ni. Ankaŭ mia patrino apogis min. Ili ĉiam estis ĉe mia flanko, kaj ili ĉiam estis en interakordo pri ĉio dirita al mi, kaj pri la apogo kiun mi ricevis de ili. Ili estas mirindaj.

La amikoj gratulis min kaj diris al mi, ke mi estis tre kuraĝa. Tio estis tre bona. Nenio maltrankviligis min, kaj mi scias, ke se mi revenus pasinten, mi agus ĝuste laŭ la sama maniero. Rilate la fotopozadon, ĉiuj instigas min, asertante ke mi havas talenton, ke mi havas ion specialan kaj ke tial mi devas plu pozi.

Esperanto em 30 horas *João José Santos*

- ★ Língua: **português** europeu
- ★ Prefácio de Geraldo Mattos
- ★ A5 – 300 páginas – ilustrado
- ★ Manual com 25 lições
- ★ Guia Gramatical ★ Anexos
- ★ Vocabulário Esper.-Português
- ★ Vocabulário Portug.-Esperanto



25 euros mais portes de envio

Estas tre bone ricevi tiun forton el la familianoj kaj el la amikoj. Mi ĝojas pro vi. Ĉu vi jam antaŭe estis aŭdinta ion pri la internacia lingvo esperanto?

Mi devas konfesi ke, foliumante unu el viaj revuoj, mi havis la unuan kontakton kun ĉi tiu lingvo, kvankam mi jam konis ĝian nomon. Mi scias, ke ĝi intencas esti ĝi internacia lingvo, je simpla kaj facila uzo, por faciligi la komunikadon en la mondo.

Jes, tiu estas la celo de la esperantistoj, ke esperanto estu la dua lingvo de ĉiu popolo. Donu al ni vian opinion pri ĉi tiu ideo. Ĉu vi opinias, ke ĝi faciligus la bonajn rilatojn inter la atletoj de malsamaj lingvoj? Kaj en la kampo de la modo? Ĉu tio faciligus la internaciigon de la fotomodeloj?

Mi pensas, ke la ideo estas ĝentila kaj utila, kvankam mi ne klare vidas, ĉu estos eble disvastigi kaj uzi ĝin universale. Nuntempe la angla lingvo uzeblas tutmonde, kaj do ŝajnas al mi pli malfacile konkretigi la celon de esperanto. Mi pensas, ke kiam esperanto naskiĝis, ĝi pli sencis. Sed oni neniam scias, kiel evoluos ĉi tiu mondo, kaj kiu do estos la futuro de esperanto.

Se vi scipovus legi en esperanto, kiujn librojn plaĉus al vi legi?

La ideoj kaj la konceptoj ne ŝanĝiĝas laŭ la lingvo subtenanta ilin. Tial la lingvo en kiu iu libro estas skribita ne ŝanĝas sian esencon. Do, mi legus ĝuste la samajn librojn, kiujn mi legas nun. Mi precipe ŝatas kelkajn aŭtorojn, kiu surbazuas siajn librojn sur la suspenso, kiel Dan Brown kaj Jean-Christophe Grangé.

Se iam vi riĉiĝos, permone ĉar pertalente vi jam estas riĉa, kiujn homamajn kaŭzojn vi subtenus?

Nuntempe Haition. Ĉio rilatanta la medion ankaŭ interesas al mi.

Mi proponas al vi imagitan ludon. Pli malfrue, je la sunsubiro, vi trapasas tie la ĝardenon kaj vi trovos, ĉe floraranĝo magian lampon. Scivoleme vi prenas la lampon, kaj subite eliras el ĝi geniulo simila al tiuj de *Mil kaj unu noktoj*. La geniulo koncedas al vi tri



personajn dezirojn, tri ajnajn dezirojn, laŭ via plaĉo, kiujn li tuj realigos, petante nenion interŝanĝe. Kion vi petos al la lampa geniulo, Ana?

Se mi havus tian bonŝancon kaj povon, mi devus uzi ĝin laŭ ekvilibra kaj saĝa maniero. Mia unua deziro estus pluesti 30-jaraĝa dum mia tuta vivo, ĉar ŝajnas al mi ke tiu estas la perfekta aĝo. Mia dua deziro estus vivi en iu monda loko, kie la vetero estus eterne somera. Mia tria deziro estus akiri de la geniulo aliajn tri dezirojn.



Rakontoj por ĉiuj aĝoj

Luiza Carol

- ★ A5 – 166 paĝoj
- ★ 26 bildoj de Luch Ofer
- ★ Belaj rakontoj por ĉiuj aĝoj

16 eŭroj plus sendokostoj



Nia intervjuo plaĉis al mi, kaj mi certas, ke ankaŭ la esperantistoj de la tuta mondo ŝatos ĝin. Ĉu vi deziras lasi vorton, mesaĝon, ion por ĉi tiu via nova publiko?

Mi provas lerni esperanton, kvankam mi ne estas lerta pri lingvoj. Mi lernis la anglan kaj la francan en la lernejo, sed mi ne kapablas paroli la francan nek la anglan.


Ana, mi donacas al vi mian lernolibron *Esperanto em 30 horas*, esperante ke vi estiĝu tiel bona esperantisto, kiel bela vi estas.

Mi tre dankas vin, kaj mi promesas, ke mi legos ĝin. Certe mi lernos esperanton, ĉar ĝi estas lingvo multe pli facila ol la aliaj.

Jen ni estis en la fino de la intervjuo. Tiam Pedro Borrego, la koramiko de Ana, aperis ĝustatempe por foti nin kaj por esti fotita. Restas la espero, ke ĉi tiuj du afablaj junuloj entuziasmiĝu pri esperanto.

Estus tre interese, ke grupo de estremozaĵ junuloj lernu la Internacian Lingvon Esperanton. La subteno de *Câmara Municipal de Estremoz* (la urbodomo) kaj de aliaj

organizaĵoj estas nepra. Estrezo povas estiĝi kultura centro de disvastigo de esperanto, kie esperantistoj de aliaj landoj trovos la afablecon, kiu karakterizas la alenteĝanojn. La avantaĝoj por la urbo kaj ĝiaj urbanoj estas evidentaj.



Liberaj tempoj

Eduardo Novembro

- ★ A5 – 124 paĝoj
- ★ Rakonto pri la ĉiutaga laborista vivo
- ★ Stilo flua en rafinita esperanto

16 eŭroj plus sendokostoj

Ana Fragoso

entrevistada por LK

**Filha de Estremoz, ela foi
em fev. de 2010 a playmate
da revista Playboy
em Portugal.**

João José Santos

La Karavelo costuma noticiar alguns acontecimentos relevantes da vida estremocense, tais como as feiras que ocorrem na cidade. Ana Fragoso é natural de Estremoz e prestigia a sua cidade natal com a notoriedade artística que vai obtendo como modelo fotográfico amador. Após ter ficado nos dez primeiros lugares num "casting" da revista FHM portuguesa, onde concorreram muitas e belas mulheres, Ana tornou-se em Fevereiro de 2010 a "playmate" da revista *Playboy* em Portugal. A revista esgotou em toda a cidade de Estremoz. Os dois jornais locais, o *Brados* e o *Ecos*, noticiaram o acontecimento. O primeiro com uma notícia, o segundo com uma entrevista acompanhada de fotografias tiradas num dos restaurantes mais chiques da cidade, *A Cadeia Quinhentista*, no castelo.

Encontrámo-nos num dos cafés centrais da cidade, a *Pastelaria Formosa*, após termos trocado várias mensagens que prepararam a entrevista. Desta bela jovem morena surge uma mulher de carácter forte, determinada e inteligente, que cedeu gentilmente as suas fotos para este número de *La Karavelo*.

Olá, Ana! Muito prazer em conhecê-la.

O prazer é todo meu.

Fale-me de si. Quem é a Ana Margarida Fragoso?

Nasci em Estremoz há 20 anos, mas na realidade tenho dias que me sinto ainda uma criança que baloiça na árvore e gosta de ver desenhos animados. Cresci em Estremoz, onde estudei até entrar para a faculdade.

Por volta dos 13 anos comecei a frequentar o ginásio, pois era demasiado magra. Comecei então a ganhar algumas formas e a gostar de moda e de fotografia. Nesta idade tirei também um curso de manequim onde aprendi, desde cedo, a desfilar. Foi assim que tudo começou. Frequentei também um curso de instrutora de "fitness" em Lisboa, quase ao mesmo tempo em que entrei no curso superior de Psicologia do Desporto, em Rio Maior.

Tenho uma personalidade que me divide. Por um lado sou introvertida e muito tímida, por outro lado consigo libertar-me dessa timidez ao ponto de posar nua para a *Playboy*. Não parece verdade, mas é. Sinto que tenho muito à vontade e uma riqueza de expressão

corporal que vai para além do comum. Solto-me em contextos e situações arrojadas, em que outras pessoas não o fariam. Isto acontece, não só a tirar fotos, mas também na dança, no ritmo, no olhar, no sorriso, na força que impregna a minha presença, desde que não tenha que me expressar usando as palavras.

Sou uma mulher comum: estudo, trabalho, leio, vou ao ginásio com frequência, namoro, procuro estar desperta com o que se passa no mundo, e tento respeitar o meu semelhante.

O seu namorado lida bem com o seu estrelato como modelo fotográfico?

Ele sempre lidou bem com estes meus pequenos trabalhos, sempre foi o primeiro a apoiar-me e a incentivar-me. É ele, inclusivamente, que supervisiona e se preocupa com o meu treino físico e com a minha boa forma.

Ana, como se consegue esse corpo esbelto?

Consigo com muito trabalho. Faço quase todo o tipo de desporto. Vou ao ginásio todos os dias, dando especial realce à musculação, uma vez que é ela a alavanca para se ter um corpo como afirma "esbelto". Não lhe chamaria propriamente "esbelto", mas sim um corpo com formas definidas.

Tenho aulas de grupo ("step", aeróbica, "body combat"...), corro sempre que posso e pratico natação desde miúda. Tudo o que possa fazer para melhorar o meu corpo é sempre um prazer.

Também tenho bastante cuidado com a alimentação. Procuro comer de três em três horas. Consumo muito pouco açúcar, sal e gordura. Não bebo álcool, e também opto por comer mais peixe e carnes brancas. Pode parecer que não, mas o facto de dormir as horas necessárias também é importante, e é isso que eu faço sempre. Tenho este estilo de vida, não só pela beleza física, mas principalmente pela saúde.

Já vi que resiste bem ao ensopado de borrego, ao vinho tinto e à sericaia ³ desta bela terra.

Claro que resisto, mas não pense que me sacrifico. Resisto porque não gosto de carne de borrego. Aquele ritual da Páscoa, em que se mata e come carne de borrego, só por si, me faz sentir repulsa. Vinho tinto ou branco, qualquer um deles, não faz as minhas delícias. Não bebo álcool. Sericaia também não como.

Desde criança sempre houve doces em minha casa, só que eu, ao contrário das outras crianças, não comia doce nenhum, para admiração dos adultos. Contam-me que quando comecei a comer sólidos, preferia sopa e salada de tomate do que as papas doces que os bebés comem. Como vê, resisto a todos esses "pecados" simplesmente porque não gosto.

Que sorte a sua. Li algures que o seu maior sonho é ser feliz. É o que todos queremos. O que a faria feliz?

Não preciso muito para ser feliz. Não tenho ambições de natureza material que possam interferir na minha felicidade. Quero, como diz, o que todos queremos: Amor. É por isso que cá estamos, e esse conceito engloba tudo o que possamos querer para sermos felizes.

Dentro de algum tempo, a Ana será licenciada em Psicologia do Desporto. Vai exercer psicologia?

Sinceramente gostaria. Afinal é o curso que estou a tirar, apesar de a vertente do desporto me interessar mais. Acho a psicologia do desporto interessante, porque estou a ganhar competências para perceber o

³ "Sericaia" - bolo típico de Estremoz.

que se passa na mente dos desportistas, porque razão eles agem de determinada maneira, e as capacidades que devem ter para praticar desporto. Estou a trabalhar para isso e espero vir a exercer, mas não posso adivinhar o que o futuro me reserva.

Acha que consegue conciliar a actividade de modelo fotográfico com a de psicóloga desportiva?

Consigo conciliar facilmente. A fotografia é uma das minhas paixões. No entanto, não se pode dizer que eu seja modelo fotográfico, por isso não me ocupa muito tempo. Neste momento também ainda não sou psicóloga, pois ainda não terminei o meu curso. Espero estar, em breve, a trabalhar nessa área. Se um dia eu fizer realmente alguns trabalhos em fotografia, farei o possível para conciliar essa actividade com a minha profissão.

Ambos sabemos, porque vivemos em Estremoz, que este ambiente social é um pouco fechado. Tem tido problemas em Estremoz por ter aparecido nua na *Playboy* portuguesa?

Não tive nenhum problema, apesar de me terem chegado rumores que houve alguns comentários ou críticas, umas mais positivas, outras nem tanto. Mas por opção minha, até porque nada disso me afecta, nem quis saber de nada. Pelo contrário, é bom falarem de nós, é porque nos estão a dar atenção, e eu gosto disso.

Como não fiz nada de que não me orgulhe, e encaro as fotos da nudez como arte, acho que só fez bem aos estremocenses terem assistido a esta minha exposição. É assim que as pessoas crescem e se mudam mentalidades.

Fico impressionado com a força do seu carácter e com a sua determinação. E os seus pais, restante família e amigos? Como vêem eles o seu sucesso no mundo da fotografia?

Vêem com bons olhos. O meu pai adora fotografia e é ele que me fotografa a maior parte das vezes. Recordo que, quando eu era miúda, havia por cima das mesas de minha casa a revista *Photo* com mulheres lindas, nuas ou seminuas, na capa, e ouvia dizer que o corpo da mulher é lindo para ser fotografado. Portanto o meu pai apoiou-me porque pensa como eu, apesar de me ter alertado para o outro lado que existe para além de nós. A minha mãe também me apoiou. Aliás, eles sempre estiveram em sintonia em tudo o que me disseram e no apoio que me deram. São fantásticos.

Os amigos deram-me os parabéns e disseram que eu tive muita coragem. Digo-lhe que foi muito bom, nada me preocupou e sei que se voltasse atrás faria precisamente o mesmo. Em relação à fotografia, todos me incentivam e dizem que eu tenho talento, que tenho algo especial e que, por isso, devo continuar.

É bom receber essa força dos familiares e dos amigos. Fico contente por si. Já tinha ouvido falar da Língua Internacional Esperanto?

Tenho que confessar que, ao folhear uma das suas revistas, tive o primeiro contacto com esta língua, embora já a conhecesse de nome. Sei que pretende constituir-se como uma língua internacional, de uso e aprendizagem fácil e simples, de forma a facilitar a comunicação no mundo.

Sim, esse é o objectivo dos esperantistas, que o esperanto seja a segunda língua de cada povo. Dê-nos a sua opinião sobre esta ideia. Acha que isso facilitaria as boas relações entre os atletas de línguas diferentes? E no campo da moda, acha que isso facilitaria a internacionalização dos modelos fotográficos?

Julgo que a ideia é generosa e útil, embora não esteja

claro na minha mente se na prática se consiga concretizar a sua divulgação e uso universal. Actualmente, com a globalização e a difusão do inglês, parece-me mais difícil concretizar o conceito. Acho que na altura em que foi concebido fazia mais sentido. Mas nunca sabemos como vai este mundo evoluir e que futuro estará reservado para o esperanto.

Se soubesse ler em esperanto, que livros gostaria de ler?

As ideias e os conceitos não mudam com a língua que os suporta, pelo que o facto de ter um livro em esperanto ou em português, nada modificaria a sua essência, pelo que leria exactamente os mesmos livros que leio agora. Tenho especial predilecção por alguns autores, que baseiam os seus livros no "suspense", como Dan Brown e Jean-Christophe Grangé.

Se um dia se tornar muito rica (de dinheiro, porque de talento já o é), que causas humanitárias gostaria de apoiar?

Agora o Haiti. Tudo o que tenha a ver com o ambiente também me interessa.

Vou propor-lhe um jogo imaginativo. Logo, pelo pôr do sol, a Ana passa ali pelo jardim e encontra uma lâmpada mágica junto a um canteiro de flores. Curiosa, pega na lâmpada e, subitamente, sai da lâmpada um génio, daqueles enormes das *Mil e uma noites*. O génio concede-lhe três desejos pessoais, três desejos quaisquer, a seu gosto, que ele prontamente executará, sem lhe pedir nada em troca. O que vai pedir ao génio da lâmpada, Ana?

Ter uma tal sorte, ou poder, significaria que o teria de usar de forma sábia e equilibrada. O meu primeiro desejo seria poder conservar-me toda a vida com 30 anos, porque me parece ser a idade perfeita. Como segundo desejo, gostaria de poder viver num lugar do globo em que existisse um verão permanente. O meu terceiro desejo seria pedir ao génio que me concedesse mais três desejos.

Gostei da nossa entrevista, e estou certo que os esperantistas de todo o mundo gostarão também. Quer deixar uma palavra, uma mensagem, algo para este seu novo público?

Vou tentar aprender o esperanto, apesar de não ter jeito para línguas. Tive inglês e francês na escola, mas não consigo falar nem francês nem inglês.

Ana, ofereço-lhe o meu livro *Esperanto em 30 horas*, com a esperança de que se torne tão boa esperantista quanto bela é.

Agradeço imenso e prometo que vou lê-lo. Vou aprender de certeza, uma vez que é uma língua muito mais fácil do que as outras.

Estávamos no fim da entrevista quando Pedro Borrego, o namorado da Ana, apareceu a tempo de nos tirar uma foto e de ser fotografado. Fica a esperança de que estes dois simpáticos jovens se entusiasmem com o esperanto.

Seria muito interessante que um grupo de jovens estremocenses aprendesse a Língua Internacional Esperanto. O patrocínio da Câmara Municipal de Estremoz e de outras entidades é fundamental. Estremoz pode tornar-se um centro cultural de difusão do esperanto, onde esperantistas de outros países encontrarão a afabilidade que caracteriza os alentejanos. As vantagens para a cidade e para os seus habitantes são evidentes.





Roger Gotardi

trad. el la portugala

La koko

Arturo Azevedo

La sceno okazas en la kamparo, je unu leŭgo for de la malplej grava stacio de la Fervojo Leopoldino ¹, vilaĝo sen geografia nomo, sed apartenanta al la municipo Riobonito ², kaj tion mi diras ĉi tie, por ke la legantoj ne supozu, ke mi elpensas historieton.

Estis en la priparolata vilaĝeto pajlokabano loĝata de du terkulturistoj, edzo kaj edzino, kiuj ĉiudimanĉe iris al la plej proksima hom-kolektiĝejo vendi la produktojn de sia eta plantkulturejo kaj aŭdi meson. Tiel ili perlaboradis la vivrimedojn, petante de Dio, ke Li ne donu al ili grandan havaĵon, sed konservu ilian sanon.

Nu, iun tagon la sano malaperis: la edzo, kvankam li estis forta kiel virbovo, iris en la liton, atakate de teruraj kolikoj, kiuj vidigis al li stelojn pro la doloro.

La edzino – kompatinda! – ne sciis, kion fari, ĉar ŝi jam antaŭe vane uzigis al la edzo ĉiujn hejmfaritajn resanigilojn. Tiam, hazarde preterpasis, je la trotado de sia azeno, D-ro Markolino, kiu medicinis lokŝanĝe tra multleŭga zono. La terkulturistino dankis al la Providenco, kiu sendis al ŝi la doktoron kaj petis lin, ke li ekzameni la malsanulon kaj resanigu lin kiel eble plej malmultekoste.


D-ro Markolino deseliĝis, eniris la pajlokabanon, ekzamenis la malsanulon, brustaŭskultis lin, martelis al li la tutan korpon per la artiklo de la dikfingro kaj eksplikis la malsanon per malfacilaj vortoj, kiujn tiuj kompatindaj homoj ne komprenis. Poste, li malfermis la vojaĝsakon, kiun li portadis ĉe la besta grupo, elprenis kelkajn flakonojn, el kies enhavo li verŝis kelkajn gutojn en glason da akvo, kaj diris doktorece:

- Jen estas pocio, trinkenda ĉiun trian horon.

- Aĥ! sinjoro doktoro, ĉi tie ni ne povas

¹ Unua fervojo konstruita en la subŝtato Minas, interliganta ties urbojn Leopoldino kaj la tiam nomata *Porto Novo do Cunha* – hodiaŭ *Além Paraíba* – kie finiĝis la reloj de la Fervojo Moŝta Petro la 2-a. (RG)

² Brazila municipo en la subŝtato Rio-de-Janeiro, situanta je 72 km for de la urbo Rio-de-Janeiro. (RG)



kalkuli la horojn, ĉar horloĝon ni ne havas!

- Gvidu vin per la suno. La suno estas bonega horloĝo, kiam ne pluvas kaj la vetero estas firma.

- Mi ne scias, doktoro, mi ne komprenas pri la sunhorloĝo.

- Tiukaze, mi ne scias, kiel... Aĥ!...

Tiun aĥ!, per kiu la doktoro interrompis tion, kion li estis diranta, kaŭzis la ĉeesto de koko, kiu majeste pasadis sur la korto:

- Jen estas horloĝo, pludiris la doktoro: tiu koko. Ĉiufoje, kiam ĝi krios, donu kuleron da resanigilo. Kaj adiaŭ! Tio estas nenio: postmorgaŭ mi revenos por vidi la malsanulon.

Foriris la kuracisto, kaj post du tagoj li revenis je la trotado de sia azeno.

Kiu lin akceptis, estis la edzo:

- Kio estas tio?... jam staranta...

- Jes, sinjoro: mi estas tute bonfarta, nenion plu mi havas. Kaj mi ne scias, kiel danki...

Sed la edzino intervenis ĉagreniĝ-tone:

- Jes, li havas nenion plu, sed la kompatinda koko mortis.

- Ĉu ĝi mortis? De kio?

- Mi ne scias, doktoro... ĝi trinkis ĉiom de la resanigilo.

- Kiu?... la koko?...

- Jes, sinjoro; ĉiufoje, kiam ĝi kriis, mi, laŭ via rekomendo, doktoro, malfermis al ĝi la bekon, kaj verŝis unu kuleron de la drogo tra la gorĝo malsupren! Kiel domaĝe! Ĝi estis tiel bela koko! ³



³ En la originalo, la konfuzon kaŭzas la plursenceco de la nereкта komplemento *lhe*, kiu en la portugala lingvo povas signifi *al li*, *al ŝi* aŭ *al ĝi*. Ĉar en Esperanto la komplemento ne estas dubasenca, por pluteni la ŝlosilon de la rakonto, mi ne povus laŭlitere, precize traduki *dê-lhe* al *donu al li* (*al la malsana edzo*), kaj do mi decidis traduki ĝin al simpla *donu*. Mi esperas, ke tiel, kaj helpe de la kunteksto, mi konservis al la leganto la amuzan surprizon rakontofinan. (RG)



Nikolaj Nečâev

Al poeto kiu nur tradukas

Ne sufiĉas nur traduki,
La poeto devas pluki
Kordon liran en la koro
Por ke trilu liaj ploro,
Ĝojo, vervo kaj amoro.

Esperantujo

Eskapos la poeto
El ordinara griz',
El solo, el vegeto
Al Verda Civiliz'.

Beletren akompanos
La bardon Esperant'.
En Verda Lando sonos
Lirike lia kant'.

Sub plenluno

Sub plenluno mi plenplenas
je poemoj kaj fabeloj.
Speguliĝas en la versoj
Nigra alto, luno, steloj.

Por kompreni...

Por kompreni la poeton vi vizitu landon lian;
Mergu vian korpon freŝen en Bajkalon melodian;
Grimpu rokon, kiun ŝturmas furiozo de la maro;
Flaru vi aromon floran kaj rezinon de pinaro;
Vidu vi ĉielon bluan, kie blankas nuboj, laroj;
Ĝuu nokte vi kortuŝan serenadon de gitaroj
Ĉe amika lignofajro, sub fabelo de stelaroj.



recenzo

Dicionário Esperanto-Português de António da Silva Almeida

titolo: Dicionário Esperanto-Português

aŭtoro: António da Silva Almeida

kompostis: António Martins-Tuválkin

eldonis: Portugala Esperanto-Asocio – Lisbono, 2010 – 2-a eldono


paĝnombro: 359 paĝoj **formato:** 23cm x 15,5cm

ISBN: 978-972-9471-38-4 **prezo:** 26 € + sendokostoj

La vortaroj de Almeida, *Dicionário Esperanto-Português* (DEP) kaj *Dicionário Português-Esperanto* (DPE), estas agnoskataj, inter la spertaj esperantistoj, kiel du el la plej fidindaj por la portugallingvanoj. Bedaŭrinde, antaŭ jaroj ili elĉerpiĝis, kio kaŭzis malfruiĝojn en la laboro de la portugallingvaj esperanto-leksikografoj, kaj senigis la esperanto-lernantojn de firma verko, sur kiu ili povas stari por firme paŝi en sia esperanto-aventuro.

Kelkaj misoj ne demetas la scienca rigoron de la vortaroj de Almeida. Tamen, 3-a eldono atente reviziita estiĝus bela regalo por la portugallingvaj esperantistoj.

Portugala Esperanto-Asocio reeldonas nun ĉi tiun verkon kun pli bela aspekto, pli neta presado kaj pli komforta legado, ankaŭ danke al la komposta laboro de António Martins. Oni esperas, ke PEA baldaŭ aperigu la alisencuman vortaron (DPE), kies manko eĉ pli sentblas ol la manko de ĉi tiu.





Edward Jaśkiewicz


trad. el la pola

HOMO KAJ TRUOJ

Balbina Świtycz Widacka

Homo fuŝe konstruita,
ĉar korp' ties tro truita.
Aspektus do estetike,
sed pro truoj sen-efike.
Se ĉi truoj ja ne estus,
tiam homo ne digestus,
truojn per truoj ne truus
kaj en ord' ĉio kongruus.
Truon en ventro ne borus,
tra la truoj ne fetorus.
Ĉu konstruaĵo laŭ bon-stilo,
se li kvazaŭ la kribrilo?
Tru' en nazo, en pugcentro,
en oreloj kaj en ventro.
Se de supre vi satiĝos,
de malsupre malpleniĝos.
Jam laŭ natur' estas tio,
ke pereas ja nenio.
Oni resatiĝas ĉiam
kaj denove faras tiam
mason kun malbon-odoro,
jam ne diru, kun fetoro.

Ho, se la homo natura
jam denaske estus pura,
kiel en bunta imago,
tiam ĉiu ties ago
estus ĉiam nur perfekta,
sen difektoj, belaspekta,
laŭ la nova, moda stilo
sen truoj, kiel kribrilo.
Tiam viv' estus pli bona,
sed sen truoj - malimpona!



Zamenhof
Um Cidadão do Mundo
Djalma Pessata

★ Língua: **português** do Brasil
★ Cerca de 60 minutos

★ DVD com documentário sobre a vida de Zamenhof

18 euros mais portes de envio



Tibor J. Szabadi

trad. el la hungara



Sub la kokardoj ¹

Ferenc K. Sabján ²

Bem-avet-oj – Petőfi-oj – Táncsics-oj! ³
Por Neforgesebla Nacio kriis viaj voĉoj.
Espero estis kun vi.
El viaj agoj de viaj koroj dehiskis ⁴ flama Flor',
Via Hungareco estis por ni.

Sed la realaĵo estis trista,
En nia hungar-patruj'.
En ĝi, fremdaj botoj
Per sovaĝaj juĝoj,
Katenis viajn sopirojn.

Sed la realaĵo estis trista.
Ni ree aŭdas viajn kriojn.
Hungaroj! Hungaroj! Hungaroj!
"Liberiĝinte" de realaj... malamikoj
Ŝafido naskis sian lupon.

La honoro estas en sakstrato,
Nebula estas la rajto en la egalec-spegulo.
Ni entombigis ŝafidojn, supervivantaj la lupoj.
Krio eĥas sub kokardoj:
Bem-avet-oj! Petőfi-oj! Táncsics-oj! Hungaroj!





Rakontoj por ĉiuj aĝoj

Luiza Carol

★ A5 – 166 paĝoj
★ 26 bildoj de Luch Ofer
★ Belaj rakontoj por ĉiuj aĝoj

16 eŭroj plus sendokostoj

¹ Hungara titolo: *A kokárdák alatt (1848-2008)* (TJS)

² La aŭtoro Ferenc K. Sabján eldonigis ĝis nun kvar poemlibrojn. Multaj el liaj poemoj aperas en diversaj publikaĵoj. (TJS)

³ Ili estas famaj hungaraj historiaj personoj de la jaroj 1848-49. (TJS)

⁴ Dehiski: Malfermiĝi per la natura disigo de la valvoj. (JJS)



Djalma Pessata

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1913

9-a Universala Kongreso de Esperanto



Loko: Berno, Svislando

Dato: de la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto

Aliĝintoj: 1203

La 9-a UK estis la lasta antaŭmilita kongreso.

En tiu kongreso Zamenhof ne paroladis.

La kongresanoj de la UK en Berno 1913 estis la solaj, kiuj vidis ĉiujn membrojn de la familio Zamenhof kunigitajn dum la kongreso.

Esperanto kaj Framasonismo

Julio Mangada (1877-1946) naskiĝis en Kubo, tiama hispana kolonio. Li estis militisto, esperantisto kaj framasono. Esperantisto de 1906 li tuj komencis propagandi Esperanton en framasona gazeto. Kunfondinto de la gazeto "Homaro" (1911), kiu en 1913 publikigis la politikan kaj religian deklaron de Zamenhof.

Li kunfondis kaj estis prezidanto dum multaj jaroj de Hispana Esperanto-Asocio. De 1928 ĝis 1930 Mangada publikigis "Hispana Esperanto-Gazeto". De 1912 Mangada gvidis multajn kursojn. Li reprezentis la hispanan registaron en kvin Universalaj Kongresoj .

Dum la 9-a Universala Kongreso de Esperanto en Berno, kunvenis Julio Mangada kaj aliaj framasonaj esperantistoj. La ĝis tiam pure esperantista "Esperanto Framasona" decidis dissolviĝi kaj estis anstataŭita de peresperanta "Universala Framasona Ligo".



Julio Mangada

Esperanto em 30 horas *João José Santos*

- ★ Língua: **português** europeu
- ★ Prefácio de Geraldo Mattos
- ★ A5 – 300 páginas – ilustrado
- ★ Manual com 25 lições
- ★ Guia Gramatical ★ Anexos
- ★ Vocabulário Esper.-Português
- ★ Vocabulário Portug.-Esperanto



25 euros mais portes de envio



Edmond Privat

Teatraĵoj Prezentitaj

► **Ginevra**, lirika dramo de Edmond Privat, prezentita dum la UK-oj en Berno 1913 kaj en Ĝenevo 1925. Ludis Helene Bertrun kaj Jules Verstaete.

La legendo de Ginevra apartenas al la romanoj de la Ronda Tablo. Pri la verko de Privat, la germana esperantisto Valc diris: "Pli bone ol pri la drama, Privat sukcesis pri la lirika parto de sia verko".

► **La Patreco**, kvarakta socia dramo de Maria Wolf.

► **Wilhelm Tell**, kvinakta dramo pri la nacia heroo de Svislando, verkita de Friedrich Schiller kaj tradukita de Ludwig Emil Meier.

Ĉu vi scias?

► René de Saussure (1868-1943). Li vicprezidis la 9-an UK-on kaj prezidis ĝian akceptan komitaton kaj kongresparoladis anstataŭ kaj nome de L.L. Zamenhof.

► La unuan instigon al serioza lernado de Esperanto Lidja Zamenhof ricevis ĝuste dum la familiaj preparoj por partopreno en la 9-a Kongreso okazonta en Berno en la jaro 1913. Ŝi tiam aĝis 9 jarojn kaj ŝiaj scioj pri Esperanto limiĝis al la signifo de la vorto "ĉokolado" kaj uzado de la esprimo "bonan nokton". La patrino Klara minacis ŝin per restado en Varsovio, do per nepartopreno en la Kongreso, se ŝi ne sufiĉe lernos la lingvon. Ŝi mirinde progresis dum sessemajna lernado, kaj en tiu proza okazaĵo certe sidas la bazo de estonta, plej fruktodona poresperanta laborado, al kiu tiu nobla animo sin dediĉis dum sia tuta vivo. (Affonso Borges Galego Soares. Brazilo. Decembro 2003)



Lidja Zamenhof



La kongresanaro en Berno


Erarkorekto

En la 17-a magazino de La Karavelo, anstataŭ:

«Zamenhof kreis la vorton "sopiro" (sopirado, resopiro, saŭdado) en la internacia lingvo pro sugesto de la brazilano João Batista de Melo Sousa.»

bonvole legu:

«La brazilano João Batista de Melo Sousa sugestis, ke Zamenhof kreu la vorton "saŭdado" (sopiro, sopirado, resopiro) en la internacia lingvo.»



Zamenhof Um Cidadão do Mundo Djalma Pessata

- ★ Língua: **português** do Brasil
- ★ Cerca de 60 minutos
- ★ DVD com documentário sobre a vida de Zamenhof

18 euros mais portes de envio



Aljejoj de Mirandelo

recepto de nekuiristo

João José Santos
tekstoj kaj fotoj

1 – Vojaĝu senhaste en Portugalio. En via mapo, vi trovos la belan nordan urbon Mirandelo (por: Mirandela). Rigardu la apudan foton. Mirandelo estas konata, i.a., pro siaj aljejoj (por: alheiras), la plej bongustaj. Tie oni trovas kelkajn vendejojn dediĉatajn al la komerco de aljejoj, olivoleo, olivoj, ŝinkoj, fromaĝoj, vino kaj similaĵoj. Aljejo estas kolbaso. Ekzistas tiom da malsamaj specoj de kolbasoj en Portugalio, ke devige oni esperantigu la diversajn nomojn, se oni volas interkompreniĝi.



2 – Jen la alloga aspekto de tiaj vendejoj. Bonkvalita aljejo kostas kilograme inter 3,25€ kaj 8,00 €, depende de la aljejo-speco.



3 – Ĉi-speca aljejo estas farita el koka viando. Ĝia interno ne estas tro grasa.



4 – Ne tranĉu nun la ŝnureton. Ĝi taŭgis por fermi la aljejon, por pendi ĝin dum ĝi sekiĝis, poste por ĝin pendi en vitromontrejo, kaj nun ĝi havas alian funkcion: ĝi evitas, dum la rostado, ke la aljejo streĉiĝu, kio povus kaŭzi ĝian krevon en la mezo. Per forko, piku ĝin diversloke sur ĉiu flanko. Tio gravas, por ke ĝi eligu grason iom post iom. Tiel ĝi ne krevos.



5 – Rostu ĝin ambaŭflanke sur milda fajro. Ĝi rapide tro rostiĝos, se oni ne kontrolos. Fakte la viandopecoj, ene de la aljejo, jam estas antaŭkuiritaj. Do, la rostado nur varmigas kaj sekigas ĝin.

6 – Post la rostado, tranĉu ambaŭ flankojn de la aljejo kaj forĵetu la ŝnureton.

7 – Servu ĝin kun ovo kaj frititaj terpomoj. Akompanu la pladon kun paneto kaj bona ruĝa vino.

